

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

«Jo no crec pas solament possible una
llengua universal, sinó que encara estic
segur que ella es difondrà ràpidament per
la terra».

René Descartes (1626)

MAJO-JUNIO 1932

N-ROJ 182-183

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof - disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.^e Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

EGALECO, FRATECO KAJ JUSTECO EN ESPERANTUJO

Malgraŭ ke en mia nacia lingvo, kataluna, jam verkis kaj paroladis pri scienco, filozofio, mistiko kaj teologio, Ramon Llull, en la 13a. jarcento, por internacia publiko; malgraŭ ke la fundamenta libro por veturmara leĝaro por la tuta mondo, "Consolat de Mar", estas verkita en kataluna lingvo en la 15-a. jarcento; malgraŭ ke la kataluna lingvo postvivis jarcertajn persekutojn de politikoj favoraj al la itala, franca kaj hispana lingvoj kontraŭ la kataluna, kiu tamen hodiaŭ estas tre vigla, mi ne povas, mi ne devas uzi ĝin en internacia konferenco; sed ankaŭ francoj, hispanlingvanoj aŭ angloj ne devas uzi sian nacian lingvon. La devo por mi estas devo por ĉiuj. Internacian konferencon ni ĉiuj devas partopreni en internacia lingvo, *dua* komuna helpa lingvo. Mi ĝoju pri tiu justeco kiun ni ŝuldas al genia aŭtoro de Esperanto. Bedaŭrinde ankoraŭ en la Ligo de Nacioj ne regas lingva justeco, nek ĉiu uzas sian nacian lingvon, nek ĉiu uzas neŭtralan komunan esprimilon. Ni devas klopodi por disvastigado de la Zamenhofa neŭtrala lingva fundamento. Ni devas organizi internaciajn Esperanto-konferencojn pri ĉiuj fakoj.

Lingva justeco fariĝu por ĉio kaj por ĉiu universala, ĉar nur justeco estas firma bazo por paco inter homoj kaj popoloj.

LINGVOJ KAJ AŬTOROJ

Sed Zamenhof ne nur celis lingvan justecon; ankaŭ lingvan ĝustecon, korektecon, purecon!

Ĉar lingvo estas la vera instrumento de kulturo, kulturo difektigas laŭ la difektiĝo de la lingvo.

Aŭtoroj atentu!

Lingvo klara, preciza, korekta helpas kaj impresas tiujn kvalitojn al la kulturo por kiu ĝi estas utiligata.

Ni scias ke kvalitoj kaj difektiĝoj de lingvo ne dependas de la lingvo mem, ke ĝi ne vivas sen popolo kiu uzas ĝin. Tial vere ne ekzistas lingvoj riĉaj aŭ malriĉaj, belaj aŭ malbelaj, mildaj aŭ akraj. Estas aŭtoroj kiuj bone aŭ malbone konas lingvon, aŭtoroj kiuj verkas aŭ paroladas en pura, riĉa, bela aŭ milda esprimmaniero, kaj aliaj kiuj uzas konfuzan, malriĉan, malbelan aŭ akran esprimaron. Kaj tio okazas ĉe iu kaj alia lingvoj.

Estas, do, grave, celi edukadon de ĉiuj infanoj, de ĉiuj homoj, lingvan kaj psikologian, moralan kaj sciencan, kaj ĉiuj lingvoj estos bonaj, kiam ĉiuj parolos korekte, konscie, bone!

Delfí DALMAU

NOUS PROTECTORS DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

La reaparicio de la nostra revista ha estat objecte de mostres de simpatia per una gran part dels nostres antics amics, que no han dubtat un moment a enviar la seva adhesio, quan han constat que nosaltres continuem seguint fidels al camí que vint anys enrera ens traça l'antic *samideano* F. Pujolà i Vallès, eminent escriptor català i prohom catalanista.

Dues adhesions ens vénen de dues ciutats memorables per a l'esperantisme català: Tarrassa i Girona. Dos capdavanter de la llengua del doctor Zamenhof, que l'han enriquida amb immillorables traduccions. Els nostres amics Marian Solà i *pastro* Josep Casanovas, vet-ací els nous ingressats a la llista d'"Amics de Kataluna Esperantisto".

Donem-los, doncs, la benvinguda, i esperem que altres *samideanos* cuitaran a enrolar-se a la creixent llista d'aquests *Amics*, mercès a l'ajuda dels quals podrem fer una entitat forta i una revista puixant, que mostraran la vitalitat dels esperantistes que s'apleguen al voltant de la bandera de la Federació Esperantista Catalana.

LLISTA DELS "AMICS DE KATALUNA ESPERANTISTO"

R. Torras Carreres.
Enric Adam.
S. Alberich Jofré.
Valentí Alavedra.
Jacint Bremon.
Eduard Capdevila.
Josep Casanovas.

Ramon Cirera.
Antoni Codorniu.
Jacint Comella.
Delfí Dalmau.
J. Font Giralt.
Maurici Orriols.
Marian Solà.

Són "Amics de Kataluna Esperantisto", aquelles persones que paguen una quota voluntària de 3'35 pessetes mensuals, o 10 pessetes trimestrals.

SOLENA INAUGURO DE "STRATO DRO. ZAMENHOF"

Grandan entuziasmon vekis ĉe la Barcelona esperantistaro la inaŭguro de "Strato de Dro. Zamenhof", kiu okazis la pasintan 14-an de Aprilo, dato kiu rememorigas al ni la datrevenon de la morto de nia kara Majstro.

La inaŭgurita *esperantista strato* estas situata proksime de la grava "Avenuo de l' 14. de Aprilo", kiu donas al ĝi meritan allogon kaj samtempe dece honorigas la nomon de la Majstro, kiu en la jaro 1909-a dediĉis plej sincerajn laŭdojn al nia urbo, kaj nun ĝi fine premias al li la ŝulditan dankemon.

La momenton malkovri la marmorplaton ĉeestis multnombra samideanaro kaj la jenaj esperanto-grupoj el Barcelona: Acadèmia Enciclopèdica Espero, Enciklopedia Akademio Esperanto, Barcelona Stelo, Paco kaj Amo, Nova Sento, Juneco, Zamenhof-Instituto, Violeto de Clavé, Fervojista Esperantistaro kaj Esperanto-Fako de A. E. P. El Tarrassa, la grupo Lumon; Aplec Esperanta Grupo, el Sabadell; Vika Esperantistaro, el Vic; kaj Esperantista Grupo, el Reus. Ankaŭ la gravaj kuracistaj institucioj de Barcelona "Collegi Oficial de Metges" kaj "Sindicat de Metges de Catalunya" estis reprezentataj de nia amiko Dro. Torres Carreras.

La ŝoseo, en tiu momento, estis plena de publiko, kaj abundas la fraŭlinaro, kies diverskoloraj vestaĵoj petole intermiksiĝas kun la grupaj esperanto-standardoj, formante unu tuton, kiu donas brillan aspekton al la nova strato, karesata de maja sunlumo, blindige radiantanta sub la blua plafono de l' ĉielo.

Antaŭ la marmorplato oni konstrus podion, el kies kvar anguloj altiĝas kvar stangoj kiuj tenas la flagojn esperantan, katalunan, hispanrespublikan kaj la Barcelonan standardon. La inaŭgurotan platon kovras verda kaj dika ŝtofo, kiu estas ĉirkaŭita de laŭrobranĉo gracie interplektita. Ĉio estas plej detale aranĝita, kaj oni jam sentas iom da emocio antaŭ la inaŭguro.

Je la dekdua tagmeze alvenas la aŭtoritatuloj, kiuj, kune kun la K. E. F.-estraro kaj reprezentantoj de la grupoj, okupas la podion. Sro. Marian Solà malfermas la feston per varma parolado; poste, Sro. Delfí Dalmau salutas la aŭtoritatulojn kaj ceteran samideanaron, kaj faras longan biografion pri la Majstro. La Prezidanto de K. E. F., Sro. S. Alberich, en la nomo de la Barcelonaj esperantistoj kiuj monhelpis la konstruon de la marmorplato, dankas al la reprezentanto de la Urbestro, Sro. Frederic Amat, lian ĉeeston, kaj petas lin akcepti la artan memortabulon de la inaŭgurata "Strato Dro. Zamenhof".

La urbkonsilanto Sro. Frederic Amat esprimas sian dankemon al la organizanto de tiu ĉi emocia solenaĵo "Kataluna Esperantista Federacio", kaj al la Barcelona esperantistaro, pro ilia merita kunlaboro, kaj finas sian paroladon revivigante la elstaran

personecon de la kreinto de Esperanto. Fininte tiun ĉi disertacion, Sro. Amat sin turnas al la stratplato kaj detiras la kovrantan ŝtofon. Aŭdiĝas kelkaj "Vivu Esperanton", dum la kapoj restas senvestitaj, kaj malsekigitaj okuloj respeguliĝas ĉe la vizaĝoj de multaj malnovaj samideanoj, kiuj kunigas sian entuziasmon al la restantaj esperantistoj per tondra aplaŭdado.

Sro. J. Gili Norta, al kiu ni ŝuldas la senriproĉan preparon kaj aranĝon de tiu ĉi festo, legas kelkajn telegramojn kaj salutleterojn de la jenaj nekatalunaj samideanoj kaj esperanto-organizaĵoj: Hispana Esperantista Konfederacio, Esperanta Societo Frateco, kaj Aragona Esperantista Federacio, el Zaragoza; Esperanta Grupo Amikeco, Aguarón (Zaragoza); Federación Esperantista Levantina, Valencia; Jaenaj Esperantistoj, Jaen; Logronja Esperantistaro, Logroño; E. M. Osmond, London.

Sro. Eduard Capdevila diras kelkajn vortojn klarigantajn la kialon, pro kiu Sro. Jaume Grau Casas ne povis partopreni la feston, kaj deklamas la jenan poezion, kiun Sro. Grau petis al li legi en la inaŭguro de la nova strato.

EN LA SOLENA MALKOVRO DE MEMORTABULO ĈE LA STRATO DOKTORO ZAMENHOF

Per bronzo fortega kaj hela marmoro
la nomon de l' Majstro ni volas vivigi,
al lia glornomo plej varme kunligi
admiron kaj amon el fundo de l' koro.

El bronzo fariĝu la Brust' en batalo
por paca kaj plena kompreno de l' homoj,
kaj mortos por ĉiam mallumaj fantomoj
pro l' helo persista de l' mond-idealo.

Per varmaj paroloj la Majstro deziris,
ke nia ĉefurbo vivkresku kaj floru;
pro tio delonge ni ĉiuj sopiris,
ke l' urbo dankeme la Majstron honoru.

Genian aŭtoron de l' lingv' Esperanto
glorkronu precipe ni eta popolo:
en tempoj malbonaj ĝi estis konsolo,
nur nun patrolingve laŭtiĝas la kanto.

Eterne lin benu, ho gent' kataluna,
kaj daŭre lin amu, vi Barcelonanoj:
hodiaŭ radias jen horo brilsuna
kaj fine ni staras kun manoj ĉe manoj.

Jaume GRAU CASAS.

Per la deklamo de tiu ĉi inspirita poezio de nia inteligenta poeto Grau Casas, oni finigas la feston, kaj ĉiuj samideanoj kaj esperantistaj flagoj formas unu solan grandan grupon, kiu perdiĝas en la malproksimon de la longaga "Avenuo de 1' 14. de Aprilo".

Ĉe la dua posttagmeze, kiel fino de la festo kaj je la honoro de la aŭtoritatuloj, okazis en la restoracio "La Pàtria" luksa bankedo, kiun ĉeestis pli ol 30 esperantistoj, kiuj amike interbabilis kaj varme aplaudis la entuziasmigitajn toastojn de niaj aŭtoritatuloj, dediĉitaj al *la bela sonĝo de l' homaro*.

Post la bankedo, kelkaj rondoj de samideanoj ekskursis al Montjuich-monto, kie okazis aviadilaj flugadoj por festi la datrevenon de la Respublikproklamon.

Edca.

LINGVA KONFERENCO ĈE ESPERANTO-DOMO DE LA CSEH INSTITUTO

Tre ĝuste esprimas resumon en "Heroldo de Esperanto", nia kara samideano Karl Minor, L. K., per siaj *Arnhemaj impresoj*.

La konferenco, kiu okazis dum Pasko en Arnhem en la Cseh-Instituto, estis nomata "I-a Internacia Lingva Konferenco", kaj oni jam antaŭe diskutis en la gazetaro, ĉu ĝi vere estos la Unua, ĉu ĝi vere estos Internacia, ĉu ĝi vere estos Lingva Konferenco. Vana kaj vanta diskutado! Estis bele en Arnhem.

Ĉirkaŭ sesdek personoj aliĝis al la konferenco kaj partoprenis en la laborkunsidoj. Sep lingvoj kaj resp. nacioj estis reprezentataj; la holanda, germana, franca, svisa, hungara, kataluna kaj rumana.

Ni aŭdis nur malmultajn nacilingvajn interparolojn; la tuta atmosfero estis internacia, intima, familiara; kaj la duan vesperon ni sidis en la konversacia ĉambro kaj interbabilis, kvazaŭ ni konus unu la aliajn jam de jaroj.

Ĉe la manĝoi — kiuj cetere havas iom strangajn por la eksterlandanoj sinsekvon kaj tempon — hazarde sidis ĉirkaŭ unu tablo: ges-roj Isbrücker (nederlandanoj), ges-roj Privat (svisoj), s-ro Rousseau (franco), s-ro Dalmau (kataluno), s-ro Cseh (hungaro) kaj mi (germano), do la anoj de ses malsamaj nacioj kaj lingvoj. Tio kompreneble devigas al Esperanta interparolado.

* * *

D-ro Privat faris referaĵon pri la evoluo de Esperanto. Li rakontis pri la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Boulogne-sur-Mer, kie la elparolado de la kunvenintoj nature estis tre malsama, kaj kie, tamen, oni miris pri ĝia simileco, kiu ebligis facilegan interkompreniĝon. Intertempe tiu malsameco tute

SONETO

Mi ankaŭ estas filo mizera de l' jarcento,
 pro la spirit' senkreda ja ankaŭ mi suferas,
 se krucon mi renkontas, ĝin sen aparta sento,
 nur kiel sensignifan signaĵon mi preteras.

Sed tamen se rigardon mi en preĝejon ĵetas
 kaj vidas maljunulojn kun blankiĝintaj haroj,
 patrinojn, kiuj tie konsolon serĉe petas
 pro la infanoj eble kuŝantaj en tombaroj,

rigardas mi al Kristo kun kortuŝita pio
 kaj mi eksentas, ke nun al sankta lok' mi venas,
 el mia brust' leviĝas malĝoja plendokrio.

Kaj mi en mia koro silente ekmalbenas
 la saĝajn homojn, kiuj per sia granda scio
 malkaŝis jam al mi ke la ĉiel' malplenas.

Konstantin VELICKOV

El la "Bulgara Antologio" de Ivan H. Krestanov.

foriĝis; oni ĝenerale eĉ ne povas aŭdi la nacianecon de esperantisto; kaj nun, en Arnhem, oni havis laborkunsidon pri temo, pri kiu oni eĉ ne pensis en Boulogne: Unueco de la elparolado.

Atentu bone, ke la rezolucio speciale konstatas, ke neniu en Arnhem pensis pri ŝanĝoj.

* * *

Sabaton, la 26-an de marto, nin akceptis la urbestro de la urbo, kaj la ĉefurbestro salutis nin per Esperanta parolado. Li klarigis tion, dirante: "Kiel la urbestro de Mekka devas koni la Koranon, tiel la urbestro de Arnhem devas posedi Esperanton!"

* * *

Pri la laborkunsidoj elvenos oficiala protokolaro, kaj ankaŭ la rezolucioj estos publikigataj.

En ĉiu lando devus esti Esperanto-Domoj, por organizado de internaciaj kursoj, konferencoj, propagando.— Bedaŭrinde ĝis nun estas nur unu de la Cseh-Instituto en Nederlando, kaj unu de I. C. K. en Francujo.

SONET

Jo sóc un dels fills del segle de la ciència;
per l'esperit incrèdul també mon cor sofreix;
quan una creu jo trobo, amb tota indiferència
sols com un trivial símbol al davant meu la veig.

No obstant, si vers un temple adreço la mirada
i veig allí que resen vellets de cabell blanc,
i mares que allí pregunten, amb faç desconsolada,
per llurs infants que foren sang de llur pròpia sang,

llavors el Crist esguardo amb una pietat nova
i sento que mon ànima en un lloc sant es troba,
i del meu pit s'aixeca un fervorós anhel.

Llavors calladament el meu esperit blasma
els sapients homes d'ara, que amb un saber que pasma,
m'han ensenyat a veure la gran buidor del cel.

Traducció catalana de Jaume GRAU CASAS.

Niaj memorataj Floraj Ludoj, ĉesintaj pro la Hispana Dikturo, atingis famon kaj profiton internaciajn. Ilia sukceso estis supera al tiu de la Literaturaj Konkursoj organizitaj de niaj Oficialaj Institucioj de la universala Esperanto-movado. —Ĉefa afero por Esperanto devas esti sukcesa profito, akcelo de fina venko!

Cetere, kie komencas oficialeco en Esperantujo, kie ĝi fiñas? Ĉu "Heroldo de Esperanto" estas oficiala aŭ ne? Ĉu ne oficiala entrepreno por Esperanto meritas, nur ĉar ĝi ne estas *oficiala*, malaprobbon de la esperantistoj?

* * *

Lingvaj kaj kulturaj problemoj de subpremataj nacioj aperis; temo interesa por organizo de internacia speciala Konferenco okazigota en Esperanto — Domo de Arnhem.— Flandroj, Kroatoj, Tirolanoj, Hungaroj, Germanoj, Poloj, Hindoj, Ĉinoj, Koreanoj kaj ceteraj nacioj kiuj sentas sin subpremataj, ĉu ni kunvenu kaj interparolu, ĉu ni interkonsentu pri niaj kulturaj kaj lingvaj problemoj, ĉu ni alvenu al konkludoj por komuna agado, ĉu ni konferencu?

Delfi DALMAU

POR "HISPANA ANTOLOGIO"

Por ke la enhavo de "Hispana Antologio" estu inda je la graveco kaj signifo de la hispanlingva literaturo, estas necese, ke ni traduku verkojn de kiel eble plej multe da aŭtoroj.

Mi indikas ĉi-sube la verkojn jam plene tradukitajn, kiujn mi sukcesis kolekti ĝis nun, kaj mi petas ĉiujn spertajn samideanojn (ne komencantojn) sendi al mi aliajn tradukaĵojn, kiujn ili jam faris antaŭ tempo kaj eĉ eble presigis, aŭ kiujn ili povas fari nun.

Oni elektu por traduko precipe prozaĵojn, ĉar jam abundas poemoj, kaj ili estu verkitaj ĉefe de tiuj aŭtoroj, kiuj ne troviĝas en la sekvanta listo de verkoj jam plene tradukitaj: Bartolomé Leonardo de Argensola, Ho Don Juan, jen time mi konfesas; Lupericio Leonardo de Argensola, Terura figuraĵo de la morto; Pedro Antonio de Alarcón, La Kristnasko de l' Poeto; José Martínez Ruíz (Azorín), La kavaliro de la verda surtuto; Concepción Arenal, La infanoj; Eusebio Blasco, Arpeĝo; Jacinto Benavente, La Angora katino, Triumfanta animo, Kruela adiaŭo, La gefavoratoj; Gustavo Adolfo Bécquer, La sekaj folioj, KREDU al Dio, Rimoj IV, XVII, XXI, XXIII, XXX, LXXIII; Conde de Villamediana, Feliĉon ĝuas nur la hom'amata; Pedro Calderón de la Barca, La urbestro de Zalamea, La vivo estas sonĝo; Miguel de Cervantes Saavedra, Don Kihoto de la Manĉo; Antaŭparolo, Ĉapitroj 1, 3, 42, 43; 45; 47; 49; 51; 53; kelkaj ĉapitroj tradukitaj de Pujulà, aliaj tradukitaj de Amalia Núñez, kaj du noveloj el "Novelas ejemplares", tradukitaj de Mangada; Ramón de Campoamor, La koncerto de l' sonoriloj, La opinio; Rubén Darío, Sonatino, Walt Whitman, La fatalo; Joaquín Dicenta, Libereco; Joaquín Dicenta (filo), Miaj amoj estas reĝaj; Epopeo: Poemo "Mio Cid"; Feliciano Enríquez, Diris Amor; José de Espronceda, Al najtingalo, Kanto de l' korsaro, Velkintaj jam miaj juneco-floroj; Gutierre de Cetina, Madrigaloj: I, II; Garcilaso de la Vega, Viaj ĉarmoj ĉe mi skribitaj restas; J. González Olmedilla, Granada, Kordovo; Luís de Góngora, Al la urbo Kordovo kaj ĝia fruktriĉeco, Dum por konkuri kun hararo via, Al la ĵaluzo; Heliófilo, Sur branĉo de arbo apud Parizo; Infante Don Juan Manuel, Grafo Lucanor; Lope de Vega, La virino, Soneton de mi petas Violante, Peribáñez kaj la Komandoro de Ocaña; Ricardo León, Al fonto; Nicolás Fernández de Moratín, Ho vi leganto kiu kun pasio, Se mi verkas en verso elokventa, Se antaŭ nobeloj kun glorbriilo; Eduardo Marquina, La amika strato, Amo malproksima, Reveno; Gregorio Martínez Sierra, Vi estas la Paco; Martínez de la Roza, La arbo de l' espero; Amado Nervo, Petu kion vi volas; Popolaj strofoj, Iluzioj, Knabino; Du kisojn mi rememoras; Popolaj kantoj: Al blinda knab' mi sentis, Kanto de draŝisto, Centre de Amerik' fruktoporta, En Kubo bela land';

Ramón D. Perés, Sorça vivo; Emilia Pardo Bazán, La martira infanino; Francisco de Quevedo, La edzo de virin' juna kaj bela, La urbo Kordovo, Pli de sindon' kaj ne plia monero; Juan Ruíz de Alarcón, La vero suspektinda, La favoroj de l' mondo; Romancoj: Amcágreno, Ĉiama amo; Sor Juana Inés de la Cruz, Mi sopiras al vir' min ne amanta; Santa Teresa de Jesús, Al Kristo krucumita; Tirso de Molina, "La villana de la Sagra"; Antonio Trueba, Kontrasto, Ondoĵ el larmoj; Francisco Villaespesa, La perla palaco; Antonio Zozaya, Fundamentaj problemoj, La pape-rujo de izolulo; María Paz Zamora, La Kristnaska donaco de l' Nunu.

Oni ne traduku la jenajn prozaĵojn aŭ proemojn, ĉar ilian tradukon mi jam komencis: Arcipreste de Hita, Libro de buen amor; Juan Meléndez Valdés, Dorila; San Juan de la Cruz, Adónde te escondiste; Concha Espina, La esfinge maragata; Fray Luíz de Granada, Guía de pecadores; Fray Luíz de León, La perfecta casada; Ricardo León, El amor de los amores kaj La escuela de los sofistas; Gabriel Miró, Las cerezas del cementerio; Miguel de Unamuno, Del sentimiento trágico de la vida; Luíz Fernández Ardavín, La dama del armiño; Fernando de Herrera, Canso la vida en esperar un día; Marqués de Santillana, Canción; Lazarillo de Tormes, de autor anónimo; Jorge Manrique, Recuerde el alma dormida; Agustín de Moreto, El desdén con el desdén.

Prefere oni traduku prozaĵojn de la jenaj aŭtoroj, kiuj ĝis nun restas netradukitaj, laŭ miaj informoj; Pío Baroja, Vicente Blasco Ibáñez, Ramón Pérez de Ayala, Pedro Mata, Armando Palacio Valdés, José María de Pereda, Benito Pérez Galdós, Juan Valera, Ramón del Valle Inclán.

Se ni sukcesos havigi al ni tradukojn el ĉiujn menciitaj aŭtoroj, "Hispana Antologio" certe estos unu el la plej kompletaj. Ni povos bedaŭri nur, ke estas malmultaj aŭtoroj hispan-amerikaj, sed la amerika literaturo en hispana lingvo estas ankaŭ tiel riĉa, ke ĝi meritas eĉ propran antologion, kompilotan de pli kompetenta samideano el la transmara kontinento.

Jaume GRAU CASAS, L. K.

Sant Quintí de Mediona (Katalunujo).

MNEMONIKA INSTITUTO DE PROF. D. FAJNSTEJN

Memorfortiga metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio, 16-paĝa prospekto, senpage havebla de la Instituto. Zawalna 15/11, Vilno, Polujo.

Enhavas programon de memorfortiga kurso kaj rekomendojn pri la metodo de diversaj personoj.

BIBLIOGRAFIO

Kiel mi lernis, de Maksim Gorkij. Eldono de *Ekrelo*, Lobauerstr., 31, Leipzig-N. 14, Germanujo. El rusa lingvo trad. P. Tilin, lingve kontrolis N. Hohlov. Prezo: 0'20 gmk.

Broŝuro 24-paĝa. La granda ruslingva verkisto rakontas kiamaniere li lernis kaj kiel li ekamis librojn. Estas kortuŝa sceno kiam Gorkij priskribas la manieron, laŭ kiu li instruis laboriston pri legado, kaj ankaŭ kiam li rakontas pri alia laboristo, kiu vizitis lin por peti de li libron.

Tiuj personoj, kiuj rifuzas legi libron ĉar ili havas la antaŭjuĝon ke ĝi ne komformas al iliaj pensoj kaj opinioj, devus atenti la jenon, kion diras Gorkij pri iu libro: "Estu ĝi malamikema al viaj kredoj, sed se ĝi estas verkita honeste, ame al homoj, dezirante al ili bonon, do, ĝi estas bonega libro.

La traduko estas tre bona, kiel ĉiuj kontrolitaj de N. Hohlov.

Sendiuloj ŝturmas Dnepron, de O. Levada. Skizoj pri ateistaj ŝturmbrigadoj. El la ukraina lingvo trad. V. Kolĉinski, lingve kontrolis N. Hohlov. Eldonis *Ekrelo*, Leipzig, 1931.

Broŝuro 16-paĝa, per kies legado oni scias pri la entuziasmo de ateistaj brigadoj en la konstruo de la Dnepra hidroelektrujo, dank' al kiu oni finos la gigantan verkon antaŭ la fiksita limdato.

La lingvaĵo estas simple perfekta. Tio malofte okazis, antaŭ jaroj, en eldonaĵoj de porlaboristaj organismoj.

Nova kaj malnova uzinmajstro, de F. Svjatenko. El rusa lingvo trad. E. Ŝvedova, lingve kontrolis N. Hohlov. *Ekrelo*, Leipzig, 1931.

Broŝuro 24-paĝa. Prezo: 0'20 gmk. La aŭtoro komparas la novan sovetian uzinmajstron kun la malnova, ĉar, kiel estas dirite en la antaŭparolo, la fizionomio de la malnova kaj nova majstro reflektas ja la respektivan socian ordon, kiel guto de akvo la sunon.

Trapafita dekreto, rakontoj de I. Tkaĉuk. El ukraina lingvo trad. Nikitus. Antaŭparolo de E. Izgur. Eldonis *Ekrelo*, Leipzig, 1931, 72 paĝoj. Prezo: 0'60 gmk.

Tri belaj rakontoj de Tkaĉuk, apartenanta al grupo de okcident-ukrainaj proletaj verkistoj. Tiuj rakontoj "realisme respegulas la obstinan bataladon de terure ekspluatata kaj nacie premata okcident-ukraina laboristaro kaj kamparanaro". Per tio niaj katalunaj socialistoj-esperantistoj vidos, ke oni povas esti terure ekspluatata kaj samtempe "nacie premata".

Jen interesa citaĵo el la antaŭparolo: la Oktobra Revolucio ebligis al 160-miliona popolo de Sovetio konstrui socialismon sur la 1/6 de l' terglobo. Oni devas mediti pri tio ĉi.

Eklezio kaj oktobra revolucio, de B. Kandidov. Eldonis: *Ekrelo*, Leipzig, 1931. El rusa lingvo trad. J. Miŝin, lingve kon-

trolis N. Incertov kaj N. Hohlov. Broŝuro 32-paĝa. Prezo: 0'20 gmk.

Priskribo de la sinteno de ĉiuj eklezioj en Sovetio kontraŭ la nova reĝimo. Tia sinteno estas parte komprenebla, se oni pensas, ke la soveta potenco agis tute laŭ la jena juĝo de Lenin: "Ĉiujn modernajn religiojn kaj ekleziojn, ĉiujn kaj ĉiajn religiajn organizaĵojn la marksismo rigardas ĉiam kiel organojn de burĝa reakcio, servantajn por defendo de la ekspluatado kaj stultigo de laborista klaso".

Ni trovas similecon kun tio ĵus farita en la Hispana Respubliko, en la jena paragrafo: "La eklezio estis apartigita for de la ŝtato. La tuta posedaĵo de ĉiuj ekzistintaj en Rusujo ekleziaj kaj religiaj societoj estis deklarita popolhavaĵo, la asignadoj de ŝtatmono en ekleziajn poŝojn ĉesis, la lernejo estis apartigita de la eklezio, kaj ĉiuj civitanoj ricevis la rajton konfesi ajnan religion aŭ tute malkonfesi". Ni diru nur, ke en Hispanujo oni respektis la posedaĵon de la eklezio, ĉar la ŝtato forprenis sole la lernejojn de unu ordeno: la jezuitoj, kaj ties preĝejojn transdonis al aliaj ordenoj aŭ al ordinaraj pastroj. koncerne asignadon de ŝtatmono, nur post du jaroj ĝi ĉesos en Hispanujo. Ankaŭ ĉe ni oni konstatis rezistadon kontraŭ la ordono pri forigo de religikultaĵoj el la lernejoj kaj aliaj lokoj. En Vilafranca del Penedés oni eĉ devigis min, en juĝejo, ĵuri antaŭ krucifikso, same kiel en la "bonaj tempoj" de la monarkio.

Se en Hispanujo oni tiel kriis pri *persekuto al la katolika eklezio*, ni komprenas ke oni trograndigis pri la rigoro de Sovetio kontraŭ eklezioj. Tamen mi diru al la rusaj amikoj, ke, eĉ se oni konsideras religion opio de la popolo, oni devas respekti la rajton de ĉiuj, fumi kion ili volas— mem ne fumante.

J. G. C.

TRI NOVAJ ESPERANTO-GAZETOJ

Nova pruvo pri la *vivanteco* de la internacia lingvo estas la apero de tri novaj gazetoj: "Scienca Gazeto Esperanta", dumonata, aperanta en Usono; "La Lumo Orienta", trimonata, aperanta en Japanujo; kaj "L'Esperanto", duonmonata, aperanta en Italujo.

La unua el tiuj gazetoj (nro. 1) enhavas interesajn artikolojn, inter ili: "Skribu sciencajn verkojn Esperante"; la dua estas organo de "Japana Budhana Ligo Esperantista"; kaj la tria promesas esti vigla informanto pri la sukcesoj de nia movado.

La bele redaktitaj artikoloj de tiu lasta gazeto, ĉefe en itala lingvo, legiĝas kun granda ĝuo. La informan valoron de "L'Esperanto" atestas artikoloj tiel trafaj kiel "La lingua internazionale in un congresso di linguisti", "Lingue naturali e lingue artificiali" kaj "La lingua universale nelle enciclopedie". La nova itala gazeto estas grandformata kaj enhavas abundan tekston en siaj 4 paĝoj. Koran gratulon!

ENLANDA KRONIKO

Barcelona. — La grupo "Nova Sento", inaŭguris esperanto-kurson, gvidatan de la profesoro Artur Domènech. La kurso estas klarigata ĉiulunde, merkrede, kaj vendrede, de la 8-a ĝis la 9-a vespere ĉe la nova sidejo de la grupo, strato Llull, 210.

Pli ol 70 lernantoj partoprenas la kurson, kaj ni devas gratuli la inteligentan profesoron Sron. Domènech, kiu uzas nian katalunlingvan "Primer Manual", kiel lernolibron por la kursanoj. Tiu ĉi racia metodo devus esti imitata de ĉiuj katalunaj esperanto-profesoroj.

— Kun neriproĉinda aranĝo la grupo "Barcelona Stelo" okazigis, pasintan 24-an Aprilo, brilan teatroprezentadon por solenigi la XXIII-an datrevenon de la grupo.

Specialan sukceson meritis la kantista rondo "La Violeta de Clavé", kiu, ĉe la fino de la programo kantita, aŭdigis nian Himnon. Nia pioniro Delfí Dalmau profitis unu paŭzon de la festo, por alparoli la neesperantistan publikon ĉeestantan per konvinka disertacio. Dank' al liaj lingvistikaj konoj, li povis uzi kelkajn ekzemplojn, kiuj respegulis la fuŝaĵojn kaŭzitajn de la tiel nomataj *naturaj* lingvoj, kiam ili sin baraktas kaj pretendas superregi unu la alian.

— La lastan jaŭdon de ĉiumanato, la grupo "Enciklopedia Akademio Esperanto" aranĝas Ekspozicion de esperantaĵoj kaj aliaj objektoj, kiuj altiras multnombrian publikon. Ni havis la ŝancon ĉeesti unu el ĉiuj ekspozicioj, kaj povis admiri multan materialon, vere allogan. La plej multo el la objektoj ekspoziciitaj estas liverataj de la eksterlandaj korespondantoj de la anoj de tiu grupo, plejparte ruslandaj.

— Nova grupo fondiĝis ĉe la strato Hospital, 110, dank' al la klopodoj de niaj samideanoj Rodellar kaj Palomera, ambaŭ KEF-komitatanoj. La nomo de tiu nova grupo estas "Barcelona Esperantisto", kaj esperanto-kursoj estas en preparo ĉe ĝia sidejo. Laŭ invito kiun ni ricevis, la 7-an de Majo Sro. Dalmau faros paroladon, kiel komencan propagandon por la cititaj esperanto-kursoj. Saluton kaj longdaŭran ekziston al la nova grupo!

— "Paco kaj Amo" organizis la ĉiujaran printempan esperantistan "Aplec", kiu okazos la 8-an de Majo ĉe Arbaro Güell de Santa Coloma de Cervelló. Atletikaj konkursoj, pilkludoj, intima tagmanĝo, kaj ĉe l' fino leteratura festo, estas la altira programo de la nomita tuttaga restado en la mirinda Arbaro Güell.

NEKROLOGO

Ni sincere esprimas nian ĉagrenon al nia samideano kaj amiko Elies Cortès, kiu estas dolore kortuŝata pro la morto de sia amata patrino.

Esperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

Federació Esperantista Catalana

i a la vegada feu-vos abonats del seu òrgan oficial


Kataluna Esperantisto

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

La Federació Esperantista Catalana paga, per cada un dels seus adherits, 60 cèntims a l'any a la Confederació Esperantista Espanyola, de recent fundació.

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.



Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

Carrer València, 245. - - Barcelona

FOTO-AMATOROJ

ATENTU!

Ni volas korespondi kaj interŝanĝi aktualajn foto-bildojn kun gekamaradoj de Hispanujo.

Skribu multnombre.

Respondo estas garantiata!
"MUNCHENA FOTO-ASOCIO"

Turnu vin al:

JOSEF ZEILHOFER

Ringseisstr., 4/II. G. H. MUNCHEN (Germanujo)

R. Torres Carreras

P. Bosch-Solà

RADIOLEGS

Passeig de Pi i Margall, 83

(abans de Gràcia)

B A R C E L O N A